

SCIENCAJ NOVAĴOJ

Mikroboj — »fajrestigistoj«.

»Dresitaj« de homo, mikroorganismoj okazis kapablaj evitigi brulegojn en ŝaktoj, kiuj estas kaŭzitaj per naturaj procesoj de memekbrulo en la karbo. Tiun subitan kapablon de bakterioj evidentigis grupo de esploristoj en instituto por monta mekaniko en Kartvela scienca akademio.

En akvo, tero kaj aero loĝas mikroboj, kiuj nutras sin per metano—eksploddanĝera gaso. Tamen en kondiĉoj de montaj ŝaktoj bakterioj pro ia kaŭzo ne volis reproduktiĝi sufiĉe rapide. En instituto oni sukcesis per metodo de selektado krei novajn aktivajn ŝtamojn (mikrobspecoj) de bakterioj.

Homoj ellernis batali kun metano en ŝaktoj, uzante fortajn aerumajn in-

stalaĵojn. SED ili iĝis nevolaj helpantoj de la alia malamiko—memekbruliĝo de la karbo.

Sufoki, evitigi tute proceson de oksidiĝo en la karbo oni ne ĉiam sukcesas, eĉ kun la helpo de hidro-korko — ŝtopo de ellaboritaj ŝaktoj per agrilaj solvaĵoj. Aero daŭras traĝi en etajn fendojn. Tamen mikroboj estas kapablaj hermetigi supraĵon de elaborita spaco. Nutrante sin ie metano ili konstruas densan membranon, kiu gardas karbon de oksidiĝo. Tiel sur la vojo de oksigeno al karbo konstruiĝas viva bariro.

Informo de K. Ĉemelidze, elrusigis
V. Golovin (Barnaul)